# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 56, Numero 04, Novembro 2020*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Luŝnikov, Provleganto: Nicole Else**

## La Aŭstralia kaj Nov-Zelanda kongreso kaj somerlernejo iĝos tutmonda

*Jonathan Cooper, kasisto de Esperanto NSW kaj vicprezidanto de AEA*

Pri la daŭraj limigoj pri vojaĝoj kaj kunvenoj rilate al KOVIM-19, la Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio decidis, ke la kongreso de 2021 estu tute interreta evento. Pro tio, oni atendas, ke partoprenontoj venos de pluraj aliaj landoj.

La kongreso daŭros iom pli mallonge ol kiam ĝi okazis ĉeeste: de sabato, la 9-a de Januaro ĝis merkredo, la 13-a de Januaro 2021. Ĉiu tago komenciĝos je 11:00 kaj finiĝos je 21:00 (laŭ la horzono de NSK kaj Viktorio). La malfrua komenco estas por ke homoj en Okcidenta Aŭstralio povu facile partopreni.

La preciza miksaĵo de teknologioj estas decidota, sed verŝajne inkluzivos la vide-konferencilon Jitsi (kiun UEA sukcese uzis dum la Virtuala Kongreso en Aŭgusto) kaj tujfluadon (live streaming) en YouTube. Por ke la kongreso havu pli komunuman etoson, Esperanto NSW intencas organizi kunvenojn ĉe Esperanto-Domo, kie membroj sufiĉe proksimaj al Sidnejo povos kune partopreni iujn virtualajn sesiojn. Pluraj aliaj grupoj ĉirkaŭ Aŭstralio kaj Nov-Zelando ankaŭ konsideras tiun ideon. Pli da detaloj venos post kiam la kongresa programo estos anoncita.

Kiom ĝi kostas? Se vi estas membro de Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA), vi povos partopreni la kongreson senpage (tamen "mondonaco" kompreneble estus tre bonvena). Tamen, se vi ne estas membro de AEA, vi rajtas pagi tiom, kiom vi povas (aŭ vi povos membriĝi al AEA kaj partopreni senpage).

Kiel aliĝi?
Por scii pli, kaj por aliĝi, iru al aea.esperanto.org.au kaj alklaku la grandan bildon: "Kongreso 2021 estos tute virtuala". (A version in English is also available at aea.esperanto.org.au/about-us/congress.)
Bonvolu ankaŭ konsideri prezenti ion (prelegon, kanton, teatraĵon, laborkunsidon ktp).
Sendu vian proponon, aŭ ideon, al prezidanto@esperanto.org.au.



## La dumtempa honorita maniero plibonigi vivojn

*Alan Turvey, direktoro de EFNSK*

La ideo de transformaj rakontoj ne estas nova. Sed tradicie ĝi estis 1-1 kiel inter amikoj aŭ kolegoj, aŭ inter terapiisto kaj kliento, aŭ alternative 1-multaj, kiel en la kazo de trejnisto aŭ vilaĝa rakontisto parolanta al publiko.

Jen ĉe mia nova retejo stories.acesuccess.com.au (en la angla) mi prezentas la ideon de multaj al 1. En Zoom ĉiu membro rakontos rakontojn (angle). Ni uzas specifan ordigon de aferoj por pli potencigi la rakontojn.

Rakontoj estis uzataj multmaniere. Estas la religiaj paraboloj, fabeloj, atestoj, sciencfikciaj, am-aferoj ktp. Forigi distraĵojn el la miksaĵo lasas rakontojn kiuj celas influi aŭ eduki, alivorte, tiujn kiuj temas pri ŝanĝado de la pensmaniero aŭ konduto.

Rakontoj gvidas nin. Ni ne devas sekvi la gvidon, sed kun ĉiu rakonto provizanta specon de sekvinda vivmapo, ne mirigas, ke kelkaj rakontoj povas doni al la aŭskultanto eliron el sia dilemo, praktikan solvon.

## Mia sonĝo

*Nicole Else, Sekretario de EFNSK*

Vi supozeble memoras, ke nia plurjara membro Steven Garamy memmortigis sin en junio. Li estis proksimume 50 jara. Li tre ŝatis lingvojn inkluzive de Esperanto kaj estis tre sportema. Li ŝatis kuri kaj foti. Li montris multajn fotojn en Facebook.

Do ĉi-nokte mi revidis Steven en mia sonĝo. Mi tuj demandis al li, kial diable li devis memmortigi sin. Ne estis tute klaraj respondoj, sed tamen li diris, ke lia patro havis akcidenton kaj subite mortis kaj ke li tre ĉagreniĝis pro tio. Evidente tio ne veras, ĉar lia patro postvivis lin.

Mi vekiĝis kaj tuj pensis priskribi mian sonĝon por Telopeo. Mi tiam reendormiĝis kaj daŭrigis sonĝi pri Steven. Mi nun tamen forgesis partojn de tiu sonĝo. Dum la sonĝo la fratino de Steven telefonis al mi, sed diris nur unu frazon. Mi nun ne memoras kion ŝi diris, sed mi memoras, ke mi tre malkontentis, ke ŝi diris nur unu mallongan frazon.

En realeco mi neniam kontaktis la fratinon de Steven, sed mi ja sendis mesaĝon al la kuzo de Steven. Li akceptis diri al mi, kiel Steven sukcesis mortigi sin, sed ne donis detalojn pri la kialoj. Supozeble eĉ la parencoj ne scias precize kial li faris tion, sed tamen ili scias pri mensaj problemoj kiujn Steven havis, sed ne deziras paroli pri tio.

Unuflanke mi komprenas, ke tuj post tiu tragedio ili ne emas klarigi. Oni respektu ilian privatecon, sed aliflanke ne nur la parencoj bedaŭras la forpason de Steven. Li havis multajn amikojn, konatulojn kiuj ankaŭ tre ĉagreniĝis. Kaj ŝajnas al mi, ke scii iom pli pri la pasinteco de Steven, pri liaj problemoj povus iom helpi almenaŭ parte akcepti tiun malfeliĉan eventon.



Steven kaj Nicole (dum somerkursaro)

## Abelaj Sklavoj

*Maria COLUBRIALE, membro de EFNSK*

Dum la tendumado, por ekskurso ni vizitis abelejon. La debaton komencis kontraŭveganoj pri la temo de abeloj. La vicprezidanto petis artikolon, kiu detalas veganan argumenton kontraŭ abelkaptiĝo.

La signifo de veganismo: «*Veganismo estas politika filozofio, kiu celas ekskludi laŭeble kaj praktikeble ĉiajn ekspluatadojn kaj kruelecojn kontraŭ bestoj por manĝo, vestaĵo aŭ iu ajn alia celo. Kaj tiel, disvastigas la evoluon kaj uzon de senbestaj alternativoj por bestoj, homoj kaj la medio. Pri dieto ĝi indicas la vivmanieron, kiu forigas ĉiujn produktaĵojn el bestoj.*»[1] Tiel vegano ne manĝas viandojn, lakton, ovojn, kaj mielon.


*Kiuj estas abeloj?* Estas tri specoj de abeloj:[2]
• Reĝino: Abelino, kiu manĝas reĝan ĵeleon dum larveco, kaj nun povas produkti ovojn.
• Abelino: Abelino, kiu laboras kaj faras diversajn taskojn, kiel trovi floron por nektaro, konstrui abelujon per mielo.
• Abeliĉo: Abeliĉo, kiu ne laboras kaj kies nura kialo por vivo estas fekundigi la reĝinon.
Abeloj estas inteligentaj[3], Abelaj laborantoj nur produktas duonon de gramo da mielo.

Abelisto ofte uzas fumon por misorientigi la abelojn. Tiu streĉas la abelojn. Oni eble demandas, «Kial la abeloj ne foriros el la abelujo?» Ĉar abeloj ne forlasus la reĝinon, kaj la abelisto tranĉis la flugilojn de la reĝino, la reĝinojn sendas per poŝto. Nature abelujo nur havas unu reĝinon, sed abelistoj ofte koruptas tiun procezon.[4] Ĉar abelisto prenas la mielon el la abeloj, la abelisto anstaŭigas ĝin per sukera siropo, el kiu gravaj nutraĵoj mankas.[5]

Ĉiujare estas amasmorto de abeloj, Abeloj simple kostas multe dum la vintro, kiam ili ne produktas mielon. Ofte la abelisto murdas (tute aŭ parte) la abelujon per fajro aŭ rubuĵa sako.[6] Ni vivas dum amasmorto de naturaj abeloj. Ĉar la naturaj polenantoj ne povas konkuri kun la abeloj de abelistoj, la nuna solvo estas bienisto de unukultivaj bienegoj luas la abelojn el abelisto.[7] La longtempa solvo estus plurakultiva plantaĵaj bienoj, kiuj uzas (kaj tiel subtenas) la naturajn polenantojn.

*Kio estas mielo reale?* Estas vomaĵo de abeloj! Abeloj produktas mielon el nektaro per kemiaĵoj en sia stomako, por konstrui sian abelujon. Tio estas stranga, ĉu ne? Kial ni manĝas vomaĵon de alia specio, la ideo sole naŭzas min, kaj eble mi vomos baldaŭ. La kialo estas karnismo. La kulturo devigas la normojn, pri kiu grupo de aĵoj taŭgas por manĝi.[8] Judoj kutime ne manĝas porkojn (kaj porkaĵon). Se oni loĝas en Julino Ĉinio, oni pensus ke hundoj estas manĝoj, sed okcidentaj manĝoj estas strangaj.

Tre fama argumento de veganismo estas: «*Nomu la trajton: kiu veras por nehomaj bestoj; kaj se ankaŭ veras por kelkaj homoj, pravigus la murdojn de tiuj homoj!*»[9] Ekzemple se la trajto estas racio aŭ inteligenteco, kaj laŭ oni tiuj trajtoj mankas por bestoj. Tamen kelkaj nehomaj bestoj havas pli grandan kapablecon kaj racion ol kelkaj homoj. Do laŭ tiu ideo etikas murdi homojn, kiuj ne havas sufiĉe da inteligenteco. La nazioj amasmurdis la malkapablularon, do la subtenanto de tiu trajto aprobus naziojn.




La homaro ekspluatas la laboron de abeloj. La abeloj ne kreas la mielon por ni sed por si mem. Bestoj ne ekzistas por la profito de la homaro. Oni devus ne posedi sklavojn, kiuj inkluzivas kaj homajn kaj nehomajn bestojn. Eble homoj havas pli da valoro ol aliaj, sed nehomaj bestoj havas sufiĉe da valoro, ke ni devus ne murdi ilin.

Antaŭ kelkaj jaroj la gazetaro raportis pri falsaj mieloj (plejparte el Ĉinio).[10] Proprofitaj firmaoj malleĝe aldonas siropon al la mielo, kiu plipezigas ĝin. Tiel oni kutime manĝas anstataŭigan mielon, kaj neniam rimarkis tion. Evidente alternativoj ekzistas, ekzemple acerosiropo, kiu estas kaj pli malmultekosta kaj pli sanema kaj certe pli etika. Se oni vere ne kredas ke abeloj havas moralan valoron pro insekteco... Oni ankoraŭ ne havas argumenton kontraŭ la ekspluatado de aliaj bestoj.

Citaĵoj:

1. Definition of veganism La Vegana Societo,
https://www.vegansociety.com/go-vegan/definition-veganism
2. Why Vegans Don't Consume Honey? Arvind Animal Activist,
https://www.youtube.com/watch?v=E7RaEaWSRm4
3. Why don't vegans eat honey? Earthling Ed,
https://www.youtube.com/watch?v=clMNw_VO1xo
4. More Than Honesy (2012)
5. The Honey Industry La Vegana Societo,
https://www.vegansociety.com/go-vegan/why-go-vegan/honey-industry
6. Is Honey Vegan? Healthy? Humane? Bite Size Vegan,
https://www.youtube.com/watch?v=E0N8UYgMGDQ
7. Vanishing of the Bees (2009)
8. The Secret Reason We Eat Meat Preter Karnismo Melanie Joy
https://www.youtube.com/watch?v=ao2GL3NAWQU
9. Name The Trait Ask Yourself
https://philosophicalvegan.com/wiki/index.php/NameTheTrait_2.0
10. ACCC launches investigation into ‹fake› honey Aŭstralia Dissendata Korporacio (ABC),
https://www.abc.net.au/7.30/accc-launches-investigation-into-fake-honey/10205888

## Zamenhof Tago

*Dmitri Luŝnikov, direktoro de EFNSK*

Zamenhof festo okazos la 13-an de decembro 2020 je la 12a (Sidneja tempo, GMT+11) en la Esperanto Domo (143 Lawson Street, Redfern).
Esperanto Federacio de NSK preparis specialan programon por la speciala tago.




12:00 - 12:30 - Malfermo. Himno. Festkuko.
12:30 - 13:00 - Zoom-kunveno kun Esperantistoj de Usono
13:00 - 13:30 - Zoom-kunveno kun Esperantistoj de Japanio
13:30 - 14:00 - Zoom-kunveno kun Esperantistoj de Aŭstralio
14:00 - 14:30 - Zoom-kunveno kun Esperantistoj de Indonezio
14:30 - 15:00 - Zoom-kunveno kun Esperantistoj de Singapuro
15:00 - 15:30 - Zoom-kunveno kun Esperantistoj de Nepalo
15:30 - 16:00 - Zoom-kunveno kun Esperantistoj de Barato
16:00 - 16:30 - Zoom-kunveno kun Esperantistoj de Irano
16:30 - 17:00 - Zoom-kunveno kun Esperantistoj de Turkio
17:00 - 17:30 - Zoom-kunveno kun Esperantistoj de Rusio
17:30 - 18:00 - Zoom-kunveno kun Esperantistoj de Germanio
18:00 - 18:30 - Zoom-kunveno kun Esperantistoj de Francio
18:30 - 19:00 - Zoom-kunveno kun Esperantistoj de Britio
19:00 - 19:30 - Zoom-kunveno kun Esperantistoj de Hispanio
19:30 - 20:00 - Fino de la festo

Festu kun ni! Ĉiuj estas bonvenaj!

EFNSW: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato estrarkunsido 11:00 ĝis 13:00
Por ĉiuj senpaga manĝeto, Esperanto Domo , Unua Dimanĉo de la monato 13:00 ĝis 15:00  (post la epidemio)
Kontaktu Jonathan Cooper 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe Bavarian Beer Cafe, Manlia Kajo
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm;  Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320  *manly@esperanto.org.au*

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero Jaŭde  17:00  la Pancake Parlour, 122 Alinga St.,Civic. Huigh 02 6288 4334 *huighm@gmail.com*




La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo:
Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 15:00 – 17:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.instagram.com/esperanto_nsw/
www.facebook.com/EsperantoNSW/
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*

| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Andrew Spannenberg |
| Vic-prezidanto: | Dmitry Luŝnikov |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Jonathan Cooper |
| Estrarano: | Alan Turvey, Adam Levy |